

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Vi aŭdas prelegaron de Charles Ecabert pri la svisa edukisto Patro Gregoro Girard.

Cl.- « Al nia rapida studo pri Patro Girard, la fama friburga edukisto, ni metos finan punkton per kelkaj vortoj, kiuj rakontas pri du aspektoj de lia instrumetodo, tio estas la reciproka lernigo kaj la instruo pri gepatra lingvo. Per tiuj du edukaj specialaĵoj li antaŭeniras sian epokon je pli ol unu jarcento. Sed kiel sciante, la pioniroj ne havas facilan taskon kaj ofte estas malfavore traktataj de siaj samtempuloj. Tion konstatis Zamenhof amare :

A.- « *La pioniroj devas multe suferi kaj batali. Oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn.* »

Cl.- Grava demando por Patro Gregoro Girard estis la plimultiĝo de la gelernantoj, jaron post jaro. Ne kreskis sammezure la nombro de la instruistoj. Feliĉe li malkovris en 1816 la lernsistemon elpensitan de du anglaj edukistoj, Bell kaj Lancaster : la reciproka lernigo. En raporto de tiu jaro Patro Gregoro ĝin nomas :

A.- « *Mirakla fenomeno, ĉiela donaco.* »

Cl.- Laŭ tiu sistemo la pli progresintaj klasanoj lernigu siajn malpli evoluintajn kamaradojn. Ariĝas grupoj direktataj de monitoroj, kaj laŭvice tiuj iĝas monitoroj, kiuj estas pli instruitaj, pli bonaj, pli lertaj : granda instigo kaj konkuremo por ĉiuj. Tiele eblas multnombra subdivido de la lernantoj kaj sekve instruo ekzakte konvena al ĉiu laŭ la grado de scioj kaj kapabloj. Oni ne diru, ke la infanoj ne kapablas instrui.

A.- « *La infano, asertas Patro Gregoro Girard, memorante pri sia infaneca sperto sub la gvido de la patrino, povas komuniki tion, kion li scias kaj li faras ĝin pli bone, ol la plimulto de la instruantoj. Jen la kaŭzo : la infano ĵus venkis la malfacilaĵon, kiun li venkigu en la aliaj, li konas ĝin, ĝi prezencas al li, do li scios kiel fari, dum la instruisto, kiu ne estas observema, ne plu memoras, kiel li sukcesis scii.* »

Cl.- Oni ne diru, ke la juna monitoro okupata pri aliula instruo perdas la tempon, ĉar diras Patro Gregoro :

A.- « *Plej bona lernmaniero estas lernigo.* »

Cl.- Krome, tiu reciproka metodo estas efika trejniĝo al demokratia spirito. Tie nur merito honoriĝas, ne naskiĝa aŭ fortuna privilegio, tie ĉiuj lernas obei la konstitutan aŭtoritaton, kiu ajn estas la socia pozicio de tiu, kiu portempe ĝin surportas. Tiu demokratia edukado pli forte aperas ankoraŭ en la kreo de infana juĝantaro.

A.- « *Kulpuloj estas notitaj sur libro nigra, kiu ĉiusemajne estas malfermata antaŭ la tuta klasanaro. Juĝantaro konsistanta el monitoroj kaj lernantoj juĝe informiĝas kaj verdikton prononcas, kiun instruisto povas konfirmi aŭ reformi, sed tio maloftas, ĉar la infanoj malofte eraras.* »

Cl.- Centoj da vizitantoj el tuta Eŭropo kaj eĉ Ameriko alkuris al Friburgo, kie, diras François Naville, ĝeneva edukisto :

A.- « *Girard estis forminta junularon tian, kian neniu urbo en la mondo povus prezenti. Se vidante ludi infanojn ĉifonkovritajn vi alproksimiĝas al ili, kredante renkonti stratbubaĉojn, vi surprizas pro tio, ke ili respondas kun ĝentileco, prudento, akcento kiu esprimas honestajn morojn kaj zorgitan edukadon. Solvon de la enigmo vi trovas en la lernejo, kiam vi observas la grupojn, kie la samaj infanoj laŭvice ekzercis kvazaŭ ludante siajn juĝkapablon kaj*

*konsciencan. Po tri aŭ kvar horoj tage dediĉitaj al tiu laboro donis al la junularo tiun inteligentecan, tiujn sentojn, tiujn manierojn, kiuj vin ĉarmas. »*

Cl.- Post malrapida evoluo dum ĉirkaŭ 12 jaroj, la eduksistemo de Patro Girard trovis definitivan startejon : kulturo per la gepatra lingvo. Profete li divenis, jarcenton antaŭe, la gravecon kaj ĉefecon de la gepatra lingvo en la instruado kaj edukado. Hodiaŭ ekzemple la svisa asocio de la duagrada profesoroj ree asertas kaj akcentas tiun saman ideon kaj faris el ĝi funda tezo de intensa kampanjo. Ĉar la faktoj, kiel la psikologiaj esploroj pruvis, ke gepatra lingvo estas nemalhavebla rimedo por spirita kulturo, Patro Girard ĝin nomas :

A.- « *fundamento de ĉia eduko, intelekta, morala, religia kaj industria. »*

Cl.- Tial retirinte sin el ĉiu publika agado, post perfidaj atakoj, li tuj fervore redaktis *Kurson pri gepatra lingvo*, elstara verko, pro kiu la famkonata ministro pri publika instruado kaj filozofa, Victor Cousin, havigis al la aŭtoro oficialan laŭdon nome de la Franca Akademio, Monthyon-premion kaj honorlegionan krucon. Girard renovigas gramatikan instruon. Ne plu gramatiko de vortoj, sed gramatiko de ideoj. Per gramatiko la infano ekzerciĝu al pensa arto. Gravan rolon tie havas la verbo, do konjugacio, kiu ne estu mekanika ripetado, sed esprimo de iu penso en ĉiuj formoj por gimnastikigi la menson.

A.- « *Verbo estas animo de la frazo* », diras Girard.

Cl.- Ni nur du esencaĵojn substreku :

A.- « *Gepatra lingvo estu kohera doktrinaro, en kiu ĉio estu ligita, reciproke lumigita kaj kompletigita. »*

Cl.- Plue :

A.- « *La elpenso de la infanoj senĉese kaj vigle lertiĝu, ĉar ni bone scias nur tion, kion ni lernis mem. »*

Cl.- La majstra verko de Patro Girard : *Kurso pri gepatra lingvo*, indas esti ankoraŭ studata kaj meditata de ĉiu interesulo pri edukado. »

A.- Per tiu prelego ĉesas legado de serio da prelegoj verkitaj antaŭ kvin jaroj de Charles Ecabert, nia antaŭulo ĉe Radio-Svislando.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-